I. F. E. A.

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente: alla INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO "I.F.E.F."; alla UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO "U.E.A."; e alla ITALA ESPERANTO FEDERACIO "F.E.I." (Ente Morale D.P.R. 28-6-1956 nº 1720).
Sede Centrale: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA

# INFORMA BULTENO=ITALA FERVOJISTO

Redazione: Via Donato Creti, nº 61 BOLOGNA (Italia) Tel. 35.90.71.

Nº 1 - 2 Januaro kaj Februaro 1964-a 14-a Jaro

## AVVISO DEL CASSIERE

Si é chiuso l'anno solare ed ancora molti dei nostri Soci non hanno versato la quota per il 1964. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni dovremo rinnovare e quindi pagare, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per i Soci degli scorsi anni, per cui preghiamo vivamente tutti ad inviare le quote urgentemente a mezzo del C.C.P. nº8/24094, oppure due righe di dimissioni. VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE SOCIALI.

Chi riceve il presente "Informa Bulteno-Itala Fervojisto" e non intende riceverlo ulteriormente, e non ha interesse al nostro movimento é pregato di farlo presente alla redazione: Via Donato Creti, 61 Bologna. Grazie anticipate. SOSTENETE LA NOSTRA ASSOCIAZIONE-ADERITE!

## 16-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

Bruselo (Belgio), inter la 9-a kaj la 15-a de majo 1964-a.
Korespondadreso: Gare Centrale-Centraal Station, Bruselo 1, Belgio
Poŝtĉekkonto: 47.70.76, B.E.F.A. Bruselo 19. Telefono: Bruselo (02) 56.83.32. Bankkonto: Kredietbank Bruselo No. 357/13/10470.
TRIA KOMUNIKO: Kongreskotizo: Ĝis 31-3-1964: 300 F. Poste: 350 F.
Kongresejo: Ĉiuj salonoj kaj salonegoj de la Brusela Centra Stacio senpage estas metitaj je la dispono de nia 16-a IFEF-Kongreso.
Glumarkoj: Ĉiuj el vi povas subteni nian 16-an per aĉeto de glumarkoj. Tri folioj=12 markoj, kostas nur 5 F. Se vi volas mendi ilin perletere, sendu tiam kiel presaĵon unu internacian respondkuponon al nia korespondadreso kaj menciu vian propran adreson sur la dorsflanko de la leterkoverto. Ni tuj sendos al vi tri foliojn.
PROGRAMO: 8-5-1964 (Vendredo) 14h.-23h. Giĉetoj malfermitaj.
9-5-1964 (Sabato): 8 - 12,30 kaj 13,30 - 20 Giĉetoj malfermitaj.
11 - Kunsido L.K.K. kaj I.F.E.F. Ĉefestraro. 12 - Kunsido Fakprelega Komitato. 13 - Komunaj tagmanĝoj. 14 - Redaktora kunveno.
15,30 - Junularestrara kunveno. 18 - Komunaj vespermanĝoj.
10-5-1964 (Dimanĉo): 9 - Solena malfermo. 12,30 - Komuna fotografado.
13,30 - Bankedo. 15 - Arta posttagmezo. 18 - Katolika Diservo.
19 - Vespermanĝoj. 20 - Internacia Balo. 15-18 Giĉetoj malfermitaj.
11-5-1964 (Lundo): 8 - 12,30 kaj 13,30 - 18 Giĉetoj malfermitaj.
9 - Unua Estrara kaj Komitatana Kunveno. 13 - Komunaj tagmanĝoj.
14 - Eventuale duontaga ekskurso. 14,30 - Kunveno de Terminara Komitato.
18 - Komunaj Vespermanĝoj. 19,30 Dua Estrara kaj Komitatana Kunveno.
12-5-1964 (Mardo): 8 - Tuttaga ekskurso al Namur kaj al Ardenoj. En Ronet vizito al la elektrona bremsservo kaj fakprelego de S-ro Kons.Hendrickx.
13-5-1964 (Merkredo): 8 - 12,30 kaj 13,30 - 18 Giĉetoj malfermitaj.
9, 15 - Unua Laborkunsido. Ekskurso por la edzinoj. 13 - Komunaj tagmanĝoj. 15 - Junulara Forumo en la junulargastejo "Sippelberg", Poststraat

**Paĝ. 2 mankas**

## KARUSELVOJAĜO 1964

Kio estas karuselvojaĝo? Karuselvojaĝo estas tute nova sistemo de vojaĝo speciale por esperantistoj. Prenu la geografian karton de Nederlando, Germanujo, Luksemburgo kaj Belgujo. Faru linion inter la urboj Amsterdam, Köln, Heidelberg, Luxembourg, Bruxelles kaj Amsterdam. Vi nun havas cirklon de vojo, kiun vi povas veturi per aŭtobuso. La esperantistoj, kiuj eksidas en la aŭtobuso en Amsterdam faras la rondon ĝis Amsterdam. Por ili la vojaĝo finiĝas en Amsterdam. La vojaĝo tamen ne estas aranĝita nur por Amsterdamanoj. Ĉar la aŭtobuso daŭrigas sian vojon kaj faras sinsekvajn ses rondojn, aliaj esperantistoj, kiuj ekzemple dumvoje en Köln, Heidelberg, Luxembourg aŭ Bruxelles aliĝas, restas en la aŭtobuso. Dum la posta rondo ili vojaĝas ĝis la loko, kie ili komencis la vojaĝon. Ĉar la aŭtobuso faras ripetiĝantan rondvojaĝon, ĝi ricevis la nomon karuselvojaĝo. Kiuj estas la avantaĝoj?

a. Esperantistoj, kiuj ne povas partopreni internacian kongreson tamen povas esti en Esperantujo.
b. La vojaĝkostoj ne estas influataj de reklamkostoj, ĉar la reklamado okazas pere de propraj revuoj, gazetoj kaj cirkuleroj.
c. Ĉar la partoprenantoj vizitas regule la samajn hotelojn, restoraciojn, vidindaĵojn, suvenir-vendejoj, ktp. oni povas postuli la aplikon de E.
d. La esperantistoj en urboj, kie ni tranoktas aŭ restadas, povas utiligi la viziton por siaj membroj.
e. La vojaĝo kontribuas al la efektivigo de la internacia unueco, pri kiu la aŭtoritatuloj kaj diplomatoj konstante alvokas.
f. Esperanto manifestas sian nerefuteblan taŭgecon al la ĝenerala publiko.

Partoprenante ĉi tiun vojaĝon vi do profitas ekonomie, vi praktikas Esperanton kun eksterlandaj samideanoj, vi propagandas Esperanton kaj dum la tuta vojaĝo vi estas en vere internacia rondo familia.
I.T.C. Internacia Turisma Centro. Aerodromo SCHIPHOL (konstruaĵo 114 ĉambro 101, 105-107) Nederland. Poŝtgirnumero 480 375. Telefono 020-155917.

## NOVAJ ESPERANTO-ASOCIOJ

<u>LA ASOCIO DE FARMACISTOJ</u> fariĝis "internacia centro" sub protekto de la itala "Sendependa Kultur-Movado". Nova adreso: Via Lucullo, n°6 ROMA.
<u>MATEMATIK-FIZIKA SEKCIO</u> estas fondita en la kadro de I.S.A.E. Organiza Komitato: Prof.V.V.Kulikov, Sazanova 33, Omsk 7, Sovetunio; Prof.O.Reiersöl, Sophus Liegt. 8, Oslo, Norvegujo; D-ro Carlo Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italio.

<u>"EL POPOLA ĈINIO"</u> estas senpage ricevebla dum 1964 por ĉiuj Esperantaj grupoj, kiuj sciigas al ni sian deziron kun indiko de 1) nomo kaj adreso de la grupo (preslitere); 2) nombro de la membroj; 3) nomo kaj adreso de la prezidanto aŭ sekretario; 4) se estas biblioteko, ankaŭ nomo kaj adreso de la bibliotekisto. La sola devo estas elmontri la ricevitajn gazetojn dum la kluba kunveno aŭ alimaniere al la membroj. Skribu tuj al Ĉina Esperanto-Ligo, P.O.Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

<u>NOVAĴOJ EL HUNGARLANDO</u>: Okaze de la Kristnaskaj kaj Novjaraj festoj mi ricevis ŝatatajn bondezirojn de nia kara "Paĉio" kaj por ĝuo de niaj legantoj mi publikigas ilin:

Porkideto, hufofero
nutras senton de l'ESPERO,
ke sukcesu ĉiu faro
por vi en la NOVA JARO:
al malĝojo pordon riglu,
la sereno en vi viglu,
vivu sane vivoarde
tamen paŝu nur singarde,
tro ne ŝvitu pro laboro,
tamen luktu kun fervoro,
al la menso obeante
aktivadu ne kormanke,
tamen AMO vin ne vundu,
en monujo mon' abundu,
la kotizon certe pagu,
malavare vigle agu
kaj kuraĝe elegante
babilu nur esperante!!

Julio BAGHY

## 49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Den Haag (Nederlando) 1 - 8 Augusto 1964. SUB LA ALTA PROTEKTADO DE ŜIA MOŜTO JULIANA, REĜINO DE NEDERLANDO.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.
Novaj Kotizoj: Ekde la 1-a de januaro validas novaj kotizoj: kongresano 50 gld.; edz(in)o 25; junulo 19; studento 31; blindulo 25.
Invitleteroj: Invitleteroj por la 49-a U.K. estos senditaj nur al pagintoj de la kongreskotizo.
Aliĝado: Ĝis la 31-a de decembro 1963 aliĝis 1441 kongresanoj el 35 landoj.

NI KORE GRATULAS: S-ro Carlo MINNAJA, estrarano de Itala Esperanto Federacio kaj de T.E.J.O., filo de nia fama Esperanto-parolisto en Radio Roma, Kav. Luigi Minnaja, brile doktoriĝis pri matematiko ĉe Pisa Universitato.

## NOVA REVUO EN ESPERANTO

Ekde la jaro 1964, dumonata, 32-paĝa, kvarkolora revuo "RIPOZOJ" eldonata en Sofio, aperos ankaŭ en Esperanto. Ĝia enhavo ampleksos distran kaj belartan legaĵon, artikolojn pri turismaj objektoj kaj somerrestadejoj, pri historiaj kaj kulturaj monumentoj, pri internaciaj sportaj eventoj k.t.p. Ĝi regule informos pri anoncitaj vizitoj de eksterlandaj esperantistoj en Bulgarujo kaj pri reciprokaj vizitoj inter bulgaroj kaj fremdaj esperantistoj. Jara abono: 1,50 usonaj dolaroj, sendenda al U.E.A. Nieuwe Binnenweg 176 Rotterdam-2, aŭ al "Ripozoj" Bulvard Tolbuhin 51, Sofio, Bulgarujo.

DEZIRAS KORESPONDI: S-ro Inĝ. NEMERE EDE, Varsò u. 28.III. BUDAPEST XIV. Hungario. 34-jaraĝa Inĝeniero ĉe la Hungara Fervojo, d.k. kun italoj.

## E S P E R A N T O  E N  L A  R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italia)- DISSENDOJ EN ESPERANTO, JARO 1964-a. La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis 19,10 (MET) Ondlongoj: m.30,90 (Mc/s 9,71);m.41,24 (Mc/s.7,27);m.50,34 (Mc/s.5,96).
Prelegantoj: marde kaj merkrede: S-ro Luigi MINNAJA - vendrede: Prof.D-ro Vincenzo MUSELLA. - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.
MARTO 1964-a: mardon la 3-an: Tra la literaturo- vendredon la 6-an: Michelangelo Buonarroti- mardon la 10-an: Novaĵoj el Italujo- vendredon la 13-an: Belaĵoj de Italujo: Erice- mardon la 17-an: Italaj kanzonoj en Esperanto- vendredon la 20-an: Galileo Galilei- mardon la 24-an: Leterkesto- vendredon la 27-an: Pasko- mardon la 31-an: Panoramoj de italaj urboj:Lucca.
APRILO 1964-a: vendredon la 3-an: La itala regiono Molise- mardon la 7-an: Tra la literaturo- vendredon la 10-an: Latinaj komediverkistoj: Terentius- mardon la 14-an: Novaĵoj el Italujo- vendredon la 17-an: La italaj insuloj Procida kaj Iskia- mardon la 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto- vendredon la 24-an: Italujo kaj fremdaj verkistoj: W.Shakespeare- mardon la 28-an: Leterkesto.

La Fakestro: L. MINNAJA

NI MEMORAS STEVAN STOJNIĈ: Fervojistan Esperanto-movadon forlasis ankoraŭ unu batalanto. En Beograd forpasis samideano Stevan Stojniĉ, konata Esperanto-veterano kaj honora membro de la Plenumkomitato de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj. Li aktivis en la movado pli ol 50 jarojn kaj restis ĝia fidela batalanto ĝis la lasta spiro. En la akompano de s-ano Stevan Stojniĉ ĝis la lasta ripozejo partoprenis multaj esperantistoj: fervojistoj kaj aliaj. Sur la florkrono de J.A.F.E. flirtis la rubando kun surskribo: "Al nia neforgesota veterano".
S-ano Stojniĉ naskiĝis en la jaro 1887, kaj tre frue venis al fervojo kie li laboris ĉefe en Ĝenerala direkcio. Jam en la jaro 1924 li estis prezidanto de Internacia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (IAFE) kaj redaktis ĝian organon "LA FERVOJISTO"en kiu li aperigis plurajn artikolojn. Li organizadia kaj gvidis multajn kursojn por fervojistoj kaj aliaj. Antaŭmilite li eldonis bonegan lernolibron de Esperanto. Li ripozu en paco!

## RAPORTO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO DUM LA JARO 1963-a

SIDEJO: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA (Italujo)
Sekretario: Via Donato Creti, nº 61 - Bologna (Italujo) Tel. nº 35.90.71.
C.C.P. (Poŝtkonto) nº 8/24094.

- ĜENERALA SUPERRIGARDO

La Itala Fervojista Esperanto-Asocio "I.F.E.A." estas kultura asocio kaj konservas sin tute for de politikaj, religiaj kaj socialaj ideologioj.

La I.F.E.A. aliĝis al la F.E.I. (Federazione Esperantista Italiana-Morala Organizaĵo pro Dekreto de la Prezidanto de la Respubliko de la 28-a de junio 1956-a) kaj al U.E.A. (Universala Esperanto-Asocio) kiel aliĝinta membro, kaj al I.F.E.F. (Internacia Fervojista Esperanto Federacio) kiel landa rondo.

- AGADO DE LA MEMBROJ

Nia membro D-ro Inĝ. Nanni kaj nia Prezidanto Kav. Zacconi estas respektive Delegito kaj Vic-Delegito de U.E.A. en Bologna. Nia Membro D-ro Inĝ. Azzi (eks estrarano kaj komitatano de U.E.A.) estas Delegito de U.E.A. en Como, kaj Ĝenerala Direktoro de grava fervoja entrepreno.

Niaj anoj Kom. Ramolfo, D-ro Falcoz, Rossino kaj Gaddoni estas Delegitoj de U.E.A. respektive en Torino, Aosta, La Spezia kaj Casalecchio di Reno (Bologna). Niaj anoj Formaggio, Dazzini, Gimelli, Maudente, Quarone, Rosso, De Salvo, Perini kaj Zorzi estas Fak-Delegitoj de U.E.A. respektive en Torino, Massa, Bologna, Milano, Torino, Roma, Trento kaj Bolzano.

Nia Honora Membro Lia Moŝto Adv. Bagnulo estas Honora Prezidanto de la Bologna Esperanto-Grupo "Achille Tellini".

- AGADOJ KAJ MANIFESTACIOJ DUM LA JARO 1963-a

Dum la lasta jaro 1963-a la I.F.E.A. partoprenis la jenajn manifestaciojn kaj disvolvis la sekvantajn aktivaĵojn:

- Partoprenis sufiĉe multnombre al 15-a IFEF-Kongreso en Stoke-on-Trent (Britujo) dum la monato de majo 1963-a, kie donacis al la Urbestro reproduktaĵon de la "Du Turoj" ricevitan de "Dopolavoro Ferroviario".
- Organizis la Nacian Kongreson de Fervojistoj-Esperantistoj kiu okazis la 15-an de septembro 1963-a en la kadro de la 34-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto okazinta en Saint Vincent (Aosta Valo).
- La I.F.E.A. organizas, kiel kutime, ĉe Profesia Lernejo de la Fervoja Administracio ĉe Centra Stacidomo en Bologna, en kunlaboro kun "Dopolavoro Ferroviario", Esperantan kurson.
- Ankaŭ en aliaj urboj okazis Esperantaj kursoj, organizitaj de la lokaj sekcioj de "Dopolavoro Ferroviario", en kunlaboro kun IFEA-Grupoj, por disvastigi la Internacian Lingvon inter la fervojistoj; ekzemple: Verona, Trieste, Milano, Voghera, Genova Sampierdarena.
- La IFEA-Grupo en Bologna memorigis dum la semajno de la 10-a ĝis la 18-a de decembro 1963-a, kune kun la Bologna Esperanto-Grupo "A.Tellini", laŭ sugesto de U.N.E.S.C.O. kaj O.N.U., la 15-an datrevenon de la Universala akcepto de la "Deklaracio de la Homaj Rajtoj" kaj la datrevenon de la naskiĝo de D-ro L.L.Zamenhof.
- La prezidantoj de pluraj sekcioj de "Dopolavoro Ferroviario" reklamis la Fervojistajn Esperanto-Kursojn per taŭgaj grandformataj koloraj afiŝoj.
- Nia membronombro, kvankam malrapide, ĉiam kreskas; ankaŭ dum la jaro 1963-a novaj membroj plifortigis nian Asocion.

- REDAKTORA RAPORTO PRI LA JARO 1963-a

Redaktejo: Bologna - Via Donato Creti, nº 61 - Tel. nº 35.90.71.

La bulteno de I.F.E.A., nomita "Informa Bulteno-Itala Fervojisto" aperis la unuan fojon en junio 1951-a, pro tio la bulteno nun fariĝis 14-jaraĝa, ĝi aperas dumonate.

La IFEA-Bulteno estas redaktata plejparte esperantlingve; nur la novaĵoj kiuj interesas ankaŭ al la simpatiantoj (rilate aliĝon, kotizojn,

kursojn, ekskursojn, k.t.p.) estas nacilingvaj. La IFEA-Bulteno estas multobligita, per tajpita stencilo, en 350 ekzempleroj po numero kaj estas dissendita senpage al ĉiuj membroj de I.F.E.A., al ĉiuj grupoj de Itala Esperanto Federacio, al ĉiu redaktoro kaj reprezentanto de eksterlandaj sekcioj de I.F.E.F., al la redakcio de la ĉefaj esperantaj gazetoj, al la radio-stacioj kiuj disaŭdigas esperantlingve, al la ĉefestraro kaj redaktoro de I.F.E.F., kaj al personoj kaj organizaĵoj en Italujo kaj eksterlando, kiuj interesiĝas pri Esperanto.

La redaktoro klopodis aperigon de artikoloj kaj novaĵoj pri Esperanto en la nacilingvaj gazetoj, precipe en la fakaj gazetoj, inter kiuj "Voci della Rotaia", gazeto eldonita de la Fervoja Administracio. Laste ĝi publikigis artikolon pri 15-a IFEF-Kongreso en Stoke-on-Trent.

La "Informa Bulteno" de I.F.E.A. estas sendita regule al la redaktoroj de la fervojistaj Esperanto-gazetoj de la jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Britio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Jugoslavio, Nederlando kaj Svislando. De la supredikitaj landaj sekcioj ni ricevis interŝanĝe la koncernan organon.

Krome I.F.E.A.-Bulteno estas sendita al la sekretariej de I.F.E.F.-sekcioj en jenaj landoj: Aŭstralio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Orienta Germanio, Norvegio, Pollando kaj Svedio.

"Informa Bulteno-Itala Fervojisto" komencis publikigi italan tradukon de Fervojaj Terminoj, sed lastatempe la aperigo de tiuj tradukoj iomete stagnis.

Eventualaj abonantoj en- kaj eksterlande estos bonvenaj. La tre modesta abonprezo estos italaj liroj 400 aŭ 4 respondkuponoj por jarabono.

Bologna, la 15-a de februaro 1964-a

LA SEKRETARIO DE I.F.E.A. KAJ REDAKTORO
DE "INFORMA BULTENO-ITALA FERVOJISTO"
(Gimelli p.i. Germano)